

La germana interlingvistika societo Gesellschaft für Interlinguistik

D-ro Seán Ó Riain, Ambasadro de Irlando, Berlino

Chi tiu estas resumo de artikolo kiu aperos en la interlingvistika revuo „Language Problems and Language Planning“ aŭtune 2003.

La germana interlingvistika societo Gesellschaft für Interlinguistik (GIL) estis fondita en Berlino en 1991 de dekdu germanaj interlingvistoj cele al interkontaktado de fakuloj pri interlingvistiko kaj esperantologio, ĉefe en Germanio. Unua Prezidanto kaj ĉefa gvidanto estas D-ro Detlev Blanke, unu el la plej eminentaj interlingvistoj en la mondo. La ĉefaj kampoj de aktivado de GIL estas disvastigo de interlingvistika scio, antaŭenigo kaj subteno de koncernaj esploroj kaj instruado, kaj apogo de nacia kaj internacia kunlaboro inter interlingvistoj. Emfaziĝas en la agado de GIL kvar kampoj:

- (a) internacia lingvistika komunikado,
- (b) lingvoplanado,
- (c) esperantologio, kaj
- (d) la instruado de Esperanto kaj interlingvistiko en universitatnivelaĵoj.

Ek de 1995 GIL aperigas la aktojn de siaj jaraj konferencoj kiel *Beiträge der Gesellschaft für Interlinguistik*. Ok volumoj aperis ĝis nun, pri temoj kiel ekzemple tradukado, terminologio, socikulturaj aspektoj de planlingvoj, leksikografio, eŭropa lingvopolitiko, kaj la strukturo de planlingvoj. Oni ankaŭ foje konsideras aliajn lingvojn, kun problemoj similaj al la problemoj de planlingvoj, ekzemple la grekan, la indonesian aŭ la irlandan. Germanio kaj Berlino bonŝancas ke ekzistas tia societo en la germana ĉefurbo, kaj estus bone se aliaj landoj, kaj aliaj ĉefurboj, provus fari same.

.....

Noto post la 88-a UK de Esperanto en Gotenburgo, 26 julio-2 aŭgusto 2003-08-04

Unu el la pli kontroversaj eroj estis la duminaŭgura prelego de Prof. Charles Durand, Universitato de Montpellier, Francio, kun titolo “La Esperantistoj kaj la asocioj defendantaj la naciajn lingvojn: Natura simbiozo”. Durand forte argumentis por intensa kunlaborado de Esperantistoj kun ĉiuj defendantoj de naciaj kaj regionaj lingvoj, por kontraŭi la mondan dominadon de la usonangla lingvo, kiu pli kaj pli minacas aliajn lingvojn.

La ĉeestantoj entuziasme aplaudis la prelegon, sed iuj poste oponis ke ĝi estas “speco de lingva naciismo”. Persone, mi ne konsentas kun la kritikantoj. Ĉu senkritike akcepti la nunan mondan lingvan situacion ne estus „akcepti specon de usonangla lingva naciismo“? La granduloj ofte emas argumenti ke defendantoj de etaj lingvoj estas naciistoj. Tion mi bone konas de la irlanda historia sperto. Ili konsideras sian propran naciismon kiel specon de universaleco. Kvazaŭ la leono postulus sian rajton manĝi aliajn bestojn en la bestoĝardeno, kaj kritikus ĉiujn penojn protekti ilin kiel „nenaturan bestan naciismon“. Malhelpi la leonon manĝi aliajn bestojn, aŭ la anglan manĝi aliajn lingvojn, ne estas naciismo. Ĝi estas protekto de la malfortaj kontraŭ la fortaj, kaj do inda je la subteno de Esperantistoj.